

P A C O kaj J U S T E C O .

Monata revuo de la grupo Brugge.Sekcio de Flandra  
Ligo Esperantista

.....  
 : Prezidanto: Drs. F.ROOSE, J.& M.Sabbestraat 12,Brugge. Tel:31981.  
 : Sekretariejo: ROOSE-DE KERSGIEKER, J.& M.Sabbestraat 12,Brugge.  
 : Propagando: MAERTENS Gr., Nieuwstraat 54, Assebroek.  
 : Poŝtkonto: 291429, Maertens Gr., Assebroek.  
 .....

"La Pirato de la Flemmuganta Suno."verkis originale en F<sup>a</sup> lingvo: A.Claeys.

En la lando de la blanka lukso de florantaj ŝerizuloj kaj birdoj, kie la Hoang-Ho puŝas sian falvan akvoamason antaŭen inter la digoĵoj, vivis Wang-Wej. Porcelanajn vazojn li pentris, en ruĝa, blua kaj ora, kaj li akiris grandan famon per liaj drakoj kaj dioj, ĝis en Peiping. Tiel granda estis lia gloro, ke la lageto en lia ĝardeno iĝis pli kaj pli malprofunda, pro la kaŝo de oro sub ĝia fundo.

Wang-Wej estis feliĉa, ĉar filon donis al li lia edzino, filon, dikan kaj belan kiel blua pruno; kaj en kanaj korbĵoj li havis sufiĉe da rizo por nutri la fratojn de lia patro ĝiujn, ilin kun ilian grandan infanaron.

Sed dum la dinastio de la "Filo de la Boneco" oni ne estis riĉa sen ke la mandareno Luna Fu Teen malsatis pro ordezirego, kiel estas malsata la riz-kampo pro la emo al akvo. Kaj nun okazis, kiam la Hoang-Ho leviĝis ĝis neniam konata alteco, kaj kiam jam ekmaltenis diversaj digoĵoj, ke oni arestis Wang-Wej, ĉar, laŭ ke oni diris, estis videblaj apud lia domo, "banditoj el la Nordo". La edzinon kaj la filon oni forĉasis sur la vojetoj, glitegecaj per la flava kolĉo...kaj Wang-Wej rememoris dum la unuaj semajnoj nur la silentajn sulutojn kiuj malklare malaperis en la malantaŭaĵoj...

Oni lin dolorigis sub la ungoj de liaj fingroj, kaj sur la haŭto de liaj plandoj; sed en la fundo de la lageto en lia ĝardeno restis netuŝata la sekreto, kvazaŭ kaŝita en la sino de la dioj.

Iun nokton, kiam la luno pendigis en la ĉielo, kiel ornamaĵo de flava silko sur malhela veluro, forĉapigis sin Wang-Wej el lia malliberejo, naĝis tra la Hoang-Ho en la direkto de la akvofluro, kaj iris al la bandita gubernio norden. Tie li trovis siajn filon kaj adzinon, ĉar de siaj gepatroj forĉovis la akvo iliajn kampojn de sub iliaj piedoj, kaj kun ili ŝi iris, kaj miloj aliaj kiel ŝi,...al la nordaj gubernioj, ĉe la banditoj...

Leteron pentris tiam Wang-Wej, direktitan al la "Filo de la Boneco" en kiu li demandis justecon. Sed la portanton de tiu letero oni arestis en Peiping, kaj kiam li ne volis diri kie estis Wang-Wej, la imperiestra edzekutisto al li forĉakis la kapon. "Vere bela bato, laŭdis la princoj, nur unu hako, kaj preskaŭ sen bruo..."

Tion eksciis Wang-Wej, kaj subita kolero ekflamis en li. Sian landon kaj imperiestron li malbenis, kaj en li kreskis la emo al vonĝo. La fundo de la lageto en lia ĝardeno iĝis iun nokton multe pli profunda, tiel, ke la etaj fiŝoj en ĝi miris havi nun tiom da spaco. Ĝipon li lasis konstrui en Tientsjin, da foje tiom grandan ol la aliaj, kaj ĝi portis du foje tiom da veloĵoj. Ankaŭ post longa pripenso, li lasis ŝanĝigi la jungaĵon tiel, ke ĝi estis multe pli malsimpla, se dpli rapide arangebla kaj prilaborebla...

Li ekzercadis en la Golfo de Petsjili kun dek banditoj, konatuloj de li el la norda gubernio, kiuj iĝis liaj amikoj. La maristoj de Tientsjin admiregis la rapidecon de la ŝipo, kaj la riĉecon de la fremdulo el la norda...kaj la rakontaĵoj, kiujn oni aŭdis pri li en la havenoj, havis la strangan ĉarmon de la mistero.

Amason da proviando oni portis en la boato, kaj plenajn ujojn

da trinkakvo; adoraĉpotojn kaj glavojn, kaj ĉiuspecajn armilojn... La alian tagon forveturis la ŝipo. Wang Wej staris sur la ponto de la ŝipo, kun filo kaj edzino. La veloj streĉiĝis je lia ordono, kaj la malvigluloj sur la kajo surpriziĝis... "Kvazaŭ birdo" ili diris... kaj tie, kie falas la ĉielo en la maro, malaperis la ŝipo; ili rigardis kaj skuis la kapon, ĉar en la ĉiela reĝlando, oni sciis ke, tiuj kiuj malaperis al la horizonto, neniam plu revenis... kaj ili rakontis ke la fremda diablo, forveturis al la infero.

Post iom da tempo, strangaj rakontaĵoj iris de buĉo al buĉo, laŭlonge de la marbordo. Oni aŭdis ilin de Seul ĝis Tientsjin, de Ning Po ĝis Fu Tŝeu... Kie estis troo da rizo aŭ greno, aŭ alia afero, mallevigis la prezoj ĉiamaniere ke oni tiel bone povis doni anstataŭ ol vendi, ... kaj kie estis maltroo, tie la prezoj estis tiaj, ke nur la riĉuloj povis nutri sin, kaj ke la aliaj nur povis mortfali pro malsato, aŭ iri al la banditoj de la Nordo. La ŝipo kiu portis sur la antaŭkilo bildon, montrantan flammugantan sunon estis pri tio la kulpo... Ĝi nur ŝtelis kelkfoje proviandon sed ĉian detruis la alian ŝipon, kiel kormozano detruas la fiŝon en la lagoj; ... kaj, strange, post la atako, la ŝipo ĉiam forveturis al la horizonto. Oni ankaŭ diris ke la ŝipestro konis la stelojn kiuj ĉiam staris en la Nordo, kaj tiujn kiuj ĉiam staris en la Sudo, tiel, ke neniam li perdis scion de direkto, kaj ĉiam retrovis la landon, kaj la ŝipojn por detru... Oni timis la "Pirato de la Flammuganta Suno" kiel la dion de la malbono... Iun tagon Karan Fu Teu anoncis sin ĉe la imperiestro, kaj li diris ke li sciis la nomon de la "Pirato de la Flammuganta Suno" kaj la imperiestro rememoris la baton "preskaŭ sen bruo" kaj la leteron, kiun foje ricevis lia patro de Wang Wej. Li lasis senkapigi Kuan Fu Teu ĉar li alportis malbonon en la gubernio; sed kiam tio okazis, ne estis princoj por laŭdi la baton de la ekzekutisto.

Ĉiamaniere eksciis Wang Wej ke la imperiestro estis favorema je li, kaj al li volis paroli. Li venis al la kajo de Tientsjin, kaj tie lin vizitis la imperiestro. Sed kiam Wang Wej aŭdis, ke tiu lin volis farigi estro de la justeco en la Ĉiela Reĝlando, li rememoris la morton de la bandito, kaj de mandareno... "Reĝlando de mi, kuŝas en la horizonto" li respondis, kaj la malvigluloj al la kajo, vidis la ŝipon forveturi kiel birdo... kaj ili al si reciproke rakontis strangajn rakontaĵojn en la teĵoj.

#### V. a. ĉ. o. j. .... pri nia kongreso.

-de S-ro T. Van Gindertaelen el Mechelen:

"En mia propra nomo mi volas aparte gratuli kaj danki vin kaj la membrojn de "Paco kaj Justeco" pro la vere Esperanta kaj unika XI-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista, kiun vi kune prezentis al la kongresanoj.

"Ĝi restas vera ĝojo kaj speciale signifa en la disvolvado de la historio de la flandra Esperanto-movado: ĉu ĝi ne estis mejloŝtono ~~ix~~ kaj samtempe vojmontro? Vi signis al la anoj kien iri kaj kiel atingi la celon. Ni akdonu ke la sukceso de nia XI-a Kongreso estas la frukto-riĉa kaj meritita rezultato de longa, persista kaj inteligenta agado."

-de S-ro E. Cortvriendt el Brussel; kaj S-ro T. Van Gindertaelen.

"En la nomo de FLANDRA LIGO ESPERANTISTA kaj de FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO ni nepre volas gratuli kaj danki vin kaj ĉiujn membrojn de "PACO KAJ JUSTECO" post la brila kaj sukcesinta XI-a Kongreso.

"Vi ne nur sindone laboris sed prezentis al la sufiĉe multnombraj kongresanoj indan, bone orditan programon kaj ni ne dubas ke ĉiuj flandraj Esperantistoj samopinias kaj samtempe envias la prosperon kaj floran de la bruga grupo.

"Ni sendube ne troigas asertante ke la XI-a Kongreso havos unikan signifon en la analoj de la flandra Esperanto-movado kaj ke ĝi montros novan kaj fruktodonan vojon al la organizantoj de postaj kongresoj: ĉu eblas al ili akiri same feliĉan rezultaton?"

"Ni sincere deziras al PACO KAJ JUSTECO kongan kaj same celkonscian evoluon kaj esperas ke ĝi kaj precipe ĝia prezidanto ludos gravan rolon en la plua disvolvado de nia kara movado."





# Angulo de la Serĉemuloj

?? ENIGMO. ??  
????????????

ank, bri, bro, cio, ĉer, fla, for, gla, go, gre, gri, kad, kap, ko, ko, ko, ko, ko, kra, kre, kre, kro, lan, lar, lo, mas, mo, mo, mo, na, no, no, pil, pip, po, po, ro, ro, ro, ro, ro, so, spi, tem, to, to, to, vit, vo, vos.

El ĉi tiuj silaboj faru 25 vortojn kun la jenaj signifoj:

- |                            |                            |
|----------------------------|----------------------------|
| 1. La bildo estas en ĝi.   | 14. Skribilo.              |
| 2. Panon oni faras el ĝi.  | 15. Alta parto de la ŝipo. |
| 3. La ŝipo havas.          | 16. Doma besto.            |
| 4. Ludilo.                 | 17. Parto de la lakto.     |
| 5. La fajro havas.         | 18. El la okuloj venas.    |
| 6. Mangilo.                | 19. Batalilo.              |
| 7. La akvo fluas tra ĝi.   | 20. En la buŝo estas.      |
| 8. Samlingvaj homoj.       | 21. Travidebla objekto.    |
| 9. Parto de la muro.       | 22. La grenoj havas.       |
| 10. Vestpurigilo.          | 23. Besta korpoparto.      |
| 11. Spico.                 | 24. La horloĝo montras.    |
| 12. La plej komforta lito. | 25. Birda korpoparto.      |
| 13. Muzikanta insekto.     |                            |

La mezaj literoj de la vortoj donas la nomon de grava dokumento.

## Serĉu la Guldenon !

La tri bravaj samideanoj kaj kamaradoj: Aleksandro, Ernesto kaj Ludoviko, studentoj ĉe la fama universitato de Lejdeno, en la komenco de la monato Oktobro kune luis meblitan ĉambroon ĉe la bonkora sinjorino M.A. Strin. La interkonsentita luprezon estis 30 guldenoj por unu monato.

La 1-an de Decembro la studentoj devis denove pagi la luprezon. Ludoviko kolektis la sumon kaj diris al la servistino Anjo:

-Fraŭlino Anjo, jen 30 guldenoj. Bonvolu transdoni ilin, kune kun nia komplimento, al la sinjorino, kiel nian lupagon por Decembro. Sed diru al ŝi, ke ni estus senfine dankaj, se ŝi iomete malplialtigus la luprezon, ĉar en niaj etaj poŝoj regas ega krizo.

La servistino prenis la monon kaj plenumis la komision. La mastrino estis en bona humoro kaj facile konsentis. Ŝi respondis al la servistino:

-Bone, Anjo, bone ! La kompatindaj knaboj sufiĉe suferas pro la sensencaj sciencoj, do ni faru al iliom da ĝojo. Jen, redonu al ili ĉi tiujn 5 guldenojn.

La servistino prenis la monon, kaj memorante je la filozofia regulo, ke la ĝojo pligrandiĝas, se ĝi estas dividita, rapide ŝovis du guldenojn en sian propran poŝon, reiris al la studentoj kaj diris:

-Sinjoroj, vi naskiĝis sub feliĉa stelo ! La sinjorino konsentis ! Ŝi malaltigis la luprezon ĝis 27 guldenoj. Jen, ŝi redonas al vi 3 guldenojn.

La studentoj ĝoje prenis la redonitajn tri guldenojn. Ili estis feliĉegaj.

o o

Sed nun aperas antaŭ ni grandega problemo. Jen ĝi: La studentoj pagis 27 guldenojn kaj la servistino ŝtelis 2 guldenojn. Tio kune faras 29 guldenojn. Do unu guldeno malaperis ! Kie ĝi estas ? Bonvolu respondi !

Sendu solvojn antaŭ 1 Septembro al E. STALPAERT, Steenstraat, BRUGGE



eniro de enorma ento. Estis fraŭlino el Juedjo, kiu nomiĝis Sinde Iyma kaj kiu estis tre kapabla prizorgi la financajn bezonojn de la gesamdeanaro. La monotoneco forpeliĝis ĉar fraŭlino Iyma ne tro interesiĝis, nek pri "Paco", nek pri "Justeco". Ŝi ja estis en ebleco veni tempe al la kunvenoj, sed ĉar ŝi ne amis la "Pacon", ŝi regule venis tro malfrue, intencante havi kvereladojn kun la sekretario.

Ŝiaj fulmantaj ŝatataj okuloj danĝere flagris kiam unu de la gemembroj ne sufiĉe rapide trovis la ŝulditan monon. Sed vi demandas eble kiel ne ŝi penis kontraŭ la Justeco. Certe estas pli malfacile kompreni tion, sed en nia societo ekzistas ja kutimo, ke fraŭlino per okulkliniĝado al viro, rajtas je batado sur tiu viro. Tio tamen ne volas diri ke ŝi definitive povas teni la viktimon. Ŝi devas tempe forlasi la malfeliĉulon al la kolero de kolegiroj, se ŝi ne volas malamikiĝi kun ili. Sinde tamen ne atentis pri tio kaj tiel militiĝis inter la animoj de ŝi kaj precipe la diktatorinoj de ka sekretario kaj prezidanto. Kapitulasiis fraŭlino Sinde Iyma kaj batite ne aŭdasis plu reveni al nia mondeto.

En la studado-ŝambro de la historiisto Esör troviĝis malgranda skatoleteto. In ĝi troviĝis steloj, flagetoj, kraĵonoj kaj tiom da etaĵoj. Ĉar la prezidanto estas tre klera homo li ankaŭ havas la distreĥalsanon. Kaj tiel okazis ke la gemembroj ne plu skribis, parolis kaj vivis Esperante. Ili ne skribis internacilingve ĉar ili ne posedis nek kraĵonojn nek paperon. Pro manko de steloj ili ne plu memore la devon paroli Esperanton. Kaj ĉar ili ne vidis la tutan tagon Esperantaĵojn antaŭ si, la vera Esperanto-vivo ne aplikigis. Sed feliĉe en nia mondeto estis sufiĉe da senlaborantoj. Kaj inter ili troviĝis malgranda, tamen vigla persono. Kaj ĉar la skatoleteto estis sufiĉe malpeza Nansjen transdonis ĝin al li kun la ordono prizorgi la vendadon de ĝia enhavo. Ygreg Tensmar, tiel nomiĝis la vendisto havis sudan temperamenton ĉar li naskiĝis en Saloniki. Tiel ni ne devas miri ke jam post mallonga tempo la skatoleteto iĝis skatolego. Ne ridu se mi profetas ke ne estas malproksima la tempo, en kiu li vendos flagetojn kun bicikloj.

Kaj vivis nun ankaŭ ĉe ni bela Flandrino. Ŝi ne estis tro alta, sed certe ne tro maldika. Kaj ĉar ŝi tre lerte kapablis trarompri la plej malgrandajn truojn oni donis al ŝi la nomon "Molly". Kaj ĉar ŝi tre ŝatis petoli ŝi ricevis la nomon "Kwikkelseertje". En tiu tempo ne estis eble atingi la monon ĝis finfine Molly sukcesis trarompri la ŝlosiltruon kaj savis la grupon el ŝiaj financaj krizoj. Pro tiu lertaĵo Kwikkelseertje alte leviĝis en la okuloj de la kolegero kaj precipe en la okuloj de la stelovendisto, intertempe iĝinta propagandisto.

Post kelkaj monatoj ekzistis vigla komercovigleco inter la granda kaso de Molly Kwikkelseertje kaj la propaganda kaso de Ygreg Tensmar. Ankoraŭ pli malfrua ekestis ankoraŭ amika vigleco inter la estro kaj estrino de ambaŭ kasoj. Iun tagon Kwikkelseertje okulkliniĝis kaj tiel laŭ nia regularo, antaŭe menciita Ygreg iĝis viktimo de Molly. Sed ĉar Tensmar estis Greka kaj posedis sudan temperamenton, li ne volis plu toleri virinan batadon. Tial li postulis al Kwikkelseertje la vendadon de Molly; ĉar ŝi rifuzis, li anoncis la militon, suferis tamen multe da malsukceso, finfine estis militkaptita kaj ekzilita al koncentrejo. Molly uzis la okazon, ke Tensmar estis en koncentrejo, por fari rabo-ekskursion al la posedaĵoj de Tensmar en Grekujo. En la mediteraneo ŝia ŝipo estis atakata de marrabistoj kaj ĝi estis sklavinigita. Molly tamen ensorĉis la rabistkapitanon, kiu konvertiĝis pro la preĝoj de la Sankta Maria-Theresia. Ili enamiĝis kaj li akompanis ŝin al Flandujo. Dumvoje ŝi propagandis Esperanton kaj floranta Italino, nome Gerria Malettissima konkludis kuniri al la lando de Paco kaj Justeco.

Mi forgesis tamen paroli pri io, kiu kaŭzis grandan timon en nia societo. Nomiĝis tiu timiganta afero SoSoSo (senkompata, sekreta servo). Oni ne povis plu promeni trankvilkore sur la stratoj. Kelkaj gemembroj ne riskis plu spiri dum malheleco, ĉar ĉie estis spionoj. La plej malgrandaj etaĵoj estis sciigataj al la SoSoSo-ĉefejo kaj la proksiman semajnon, oni povis atendi grandan publikan raporton kun severa kritiko. Feliĉe ekestis la KiKoKu (kiu kontraŭas kulpulojn) kies laboro troviĝis en batalado kontraŭ la SoSoSo. Kvankam la KiKoKu pli malfrue kapitulaciis la SoSoSo perdis sian valoron pro la multe da sango, kiun ĝi perdis.

-Sed nun mi ĉesos, mi iĝas tro distrema ĉar en la malproksimeco, mi aŭdas kanton de la Fruĝaj sanideanoj...

Ĉar en nia Paco kaj Justeco  
oni ja neniam malkuraĝas.

TINO.